ESPERANTA GRUPO "L.L. ZAMENHOF" - VENEZIA

V E N E Z I A = 162,695.= Je kvar kilometroj de la firma tero, al kiu ĝin kunligas duobla ponto (por fervojo kaj por ordinara vojo). Konstruita sur aro da insuletoj, ĝi estas urbo unika en la mondo pro siaj belegaj artaj konstruaĵoj, kiuj speguliĝas en la multenombraj kanaloj. Antikve glora mara respubliko, kies memoraĵoj troviĝas laŭlonge la marbordoj de ĝiaj vastegaj terposedaĵoj.= Mezaj temperaturoj: jara 13°,7, somera 23°,4, vintra 4°,1.= Supera Instituto de Komercaj Sciencoj, Belarta Akademio, Supera Arkitektura Lernejo, Konservatorio, gravaj Bibliotekoj.= Internacia Arta Ekspozicio (aprilo-oktobro de 1 a parnombraj jaroj) .= Flughavenoj por aeroplanoj (Lido) kaj por Hidroplanoj (insulo S. Andrea);=Arsenalo.= Industria porto de Marghera (je la fino de la ponto, sur la firma tero), kun urba kvartalo kaj gravaj industriaj fabrikejoj.= Vidindaĵoj: Placo de S. Marco, Granda Kanalo, Ponto de Rialto, Doĝa Palaco (kun multenombraj famaj pentraĵoj); Preĝejoj: S. Marco, S. Giovanni e Paolo, Frari, S. Sebastiano, Madonna dell'Orto, S. Zaccaria, S. Maria dei Miracoli, S. Rocco kaj samnoma "Scuola", S. Maria dei Carmini kaj samnoma "Scuola", Salute, S. Giorgio, Redentore; Muzeoj: "Correr" arta kaj historia, Reĝaj Galerioj, Ca' d'Oro, Internacia Galerio de Moderna Arto, Orienta Arto, Naturscienca (gvidfolio en Esperanto).= Gravaj ĉirkaŭaĵoj: Lido (unu el la plej fame mondkonataj banstacioj); Murano (preĝejoj de SS. Pietro Martire kaj SS. Maria e Donato; artaj vitraĵoj kaj kristalaĵoj); Burano (puntoj); Torcello (katedralo kaj preĝejo de S. Fosca); Chioggia (plej grava fiŝkaptista urbo en Italio; karakteriza aspekto pentrinda kiu ĝin similigas al Venezia).

L o k a o r g a n i z o .= Esperanta Grupo "L.L. Zamenhof" provizora adreso: S. Cassiano, 1557.= Kursoj, rendevuoj, propagando. Renkontejo: Bar Moderno, Campo S. Luca, merkr. 21/22. Estraro: P. Prof. C. Minio-Paluello, S. Cassiano, 1557; Sekr. G. Bonini, S. Angelo, Calle Avvocati, 3901 A; Kas. A. Stefanin, Castello, 2643; Kons. S. Biancat, S. Cassiano, 1769; F. Rizzotti, Castello, 2694; Anst. Kons. P. Franceschi, Dorsoduro, 2475; E. Borin, Castello, 3464.= Praktikaj servoj: D. Giovanni Bonini, oficisto, S. Angelo, 3901 A Entreprenoj: Hotelo Centauro, Campo Manin = oni parolas Esperante= familia traktado ĉ tuta pensiono lirojn 25 ĉ simpla ĉambro: vintre 8/16, somere 10/20 = trinkmono entenata en la prezoj.